DIA REGNO

ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 1 (910) • 2015 •



Jesuo Kristo kaj la Samarianino ĉe la puto. Pentristo Károly Steinacker, 1801-1871, laŭ altara pentraĵo de Károly Brocky.

## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
☎ +420311241406;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).



***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***



**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| Jesuo, la Samarianino kaj ni | 3 |
| "Ne deiru!" - Vespera preĝo | 6 |
| Donacetoj | 9 |
| Přemysl Pitter, heroo de amo | 10 |
| Jesuo Kristo ankoraŭ aperas al homoj | 14 |
| Invito al bibliaj tagoj en Vroclavo | 18 |
| La nuna mondo, vintro por la justuloj | 20 |
| "Patro Nia" – alvoko | 21 |
| Aliĝintoj al ekumena kongreso | 22 |
| Nekrologo de Wim Derks | 23 |
| Aŭdu, Di' de l' am' | 24 |


## Redaktoraj vortoj

Legante la artikolojn en tiu ĉi gazeto, kvankam tre diversaj, ni renkontas en ili vivhistoriojn kiuj iel enhavas homajn rilatojn. Rilatoj kiuj radias amon.

Kontraste ni daŭre kaj ĉiutage aŭdas pri teruraj agadoj faritaj de homoj kontraŭ aliaj homoj. Mi neniam ĉesos miri pri la kruelaj agoj, kiujn homoj kapablas montri unu al la alia. Ĉu ni kristanoj povas per amplena agado montri alian sintenon en la praktika ĉiutaga vivo?

Mi esperas ke vi en la artikoloj trovas inspirigajn ekzemplojn kaj modelojn por ke ni povu en nia vivsituacio montri amon al niaj kunuloj kaj kontraŭstari la multajn maltoleremajn sintenojn kiuj plifortiĝas kaj influas niajn sociojn.

Mi esperas, ke Vi trovas la gazeton interesa.

# Jesuo, la Samarianino kaj ni

Philippe COUSSON, FR

> Li venis ĉe la Samaria urbo Sihar, apude al la terpeco, kiun donis Jakob al sia filo Jozef. Estis tie la puto de Jakob. Jesuo, elĉerpita de la vojaĝado, eksidis do ĉe la puto. Estis ĉirkaŭ la sesa. Samaria virino venis ĉerpi akvon. Diris al ŝi Jesuo: Donu al mi trinki.
>
> Joh 4, 5-7 laŭ la traduko de G. Berveling

Por tiuj kelkaj enkondukaj vortoj al la temo de la kongreso, mi ĉerpis el la tekstoj verkitaj por la preĝsemajno por la unueco de la kristanoj.

La brazilaj eklezioj elektis tiun tekston de Johano 4 pro la maltoleremo kaj perforto kiu manifestiĝas tie. Ili volas tiel indiki la neceson kaj urĝon de la dialogo inter kristanoj kaj de la reciproka agnosko.

Trairante tiun tekston, ni lernos kiamaniere alparoli kaj aŭskulti la alian kaj en ĉio ricevi kaj transdoni la vivan akvon.

Samario estis tiu provinco kiu pro historiaj kaŭzoj enhavis tre miksitan popolon. Ĝi estis rigardata de la Judajanoj[1] kiel pagana tero, kiam la Samarianoj diras ke ilia patro estas Jozefo kaj ke ili prave adoras Dion.



Nathaniel Currier (1813 – 1888)

La Judajanoj, termino uzata por eviti la konfuzon kun la nuntempaj Judoj, vivis krom dise en la tuta Romia Imperio kaj ankaŭ ekstere, ĉefe en du landpartoj, Judajo ĉirkaŭ Jerusalem, kaj Galileo. Inter tiuj du regionoj troviĝas Samario. Por eviti ĝian trapason, la homoj el Galileo vojaĝante el kaj al Jerusalemo ĝenerale ĉirkaŭiras Samarion.

Kaj ĉi tie ni legas, ke Jesuo "devis trairi tra Samario". La kialo de tiu devigo ne estas indikita, krom ke tio

permesis tion kio okazis. La neebla kontakto inter Judajanoj kaj Samarianoj devis esti efektivigata. Tiun neeblan dialogon volis instali Jesuo.

Kie estas por ni niaj Samarioj, la ekleziaj lokoj kiujn ni ne volas viziti, la kristanoj kiujn ni malfacile agnoskas? Ĉu ne troviĝas kristanaj fratoj, kredantoj kiujn ni nepre "devas" viziti, renkonti?

Laca, Jesuo sidiĝis. La kaŭzo de tiu laco ne estas konata. Eble pro tiu reciproka malfido.

> La diskuto okazis pri tio kio malsamas. Ĉu ni parolas ĉefe pri tio kio malsamas, aŭ tamen de tempo al tempo pri tio kio samas?

Tiu renkonto ĉe puto ne estas la unua en la Biblio. Fakte tieaj renkontoj estis oftaj, krom la horo en kiu oni evitas eliri pro la varmo. Ne ia ajn puto ĝi estis. Estis la puto de Jakob, grava loko por ambaŭ popoloj. Komencite per banala demando pri akvo, la malprobabla diskuto rapide iris al religiaj demandoj. Ĉe puto aŭ ĉe trinkejo, ni ne kutime parolas pri religio aŭ spiritaj aferoj. Sed tiel estis laŭ la rakonto.

La diskuto okazis pri tio kio malsamas. Ĉu ni parolas ĉefe pri tio kio malsamas, aŭ tamen de tempo al tempo pri tio kio samas? Ĉu ni ne facile parolas pri la "veraj adorantoj"?

Ni efektive bezonas putojn, renkontiĝejojn por diskuti, por agnoski kio samas.

Meze de tiu "spirita" diskuto, Jesuo demandas la virinon pri ŝia edzo. Strange. Neniu scias kia estis ŝia vivo. Neniu scias la kialon de ŝia situacio. Eble ŝia veno tagmeza al la puto rilatas al tio. Eble. Ĉu ŝia vivo estis skandala? Oni ne scias. Ni tamen scias ke en preskaŭ ĉiu epoko la situacio de la virinoj ne estas facila. Jesuo aŭdacis alparoli virinon solecan kaj li alfrontis ŝian situacion.

Meze de niaj komunumoj, kelkaj situacioj aspektas skandalaj. Sed ĉu ni ĉion scias?

En niaj eklezioj, en niaj societoj, kio estas la situacio kaj rolo de la virinoj? La tuta Nova Testamento atestas pri la agado kaj graveco de virinoj.

Anstataŭ eviti la renkonton, Jesuo kaj la virino ebligis tiun dialogon inter malsamaj homoj. Tio okazis ĉar ambaŭ malobeis kutiman regulon, kutiman konduton.

La virino lasis sian akvokruĉon kaj foriris en la urbon. Tio signas la ŝanĝiĝon en ŝia vivo. Ŝi nun estas atestantino pri la renkontita Mesio. Por tiu viva akvo, kiun ŝi ricevis, ŝi ne plu bezonas kruĉon. Ŝi nun havas rolon meze de sia popolo.

Eble ni devas lasi post ni "kruĉon" por fariĝi atestantoj pri la Mesio. Kiun? Mi ne povas diri. Vi scias.

Ĉe la puto, Jesuo soifis. Kaj kiel rimarkigis al li la virino, li ne havas ĉerpilon. Se li ne povas akiri al si akvon, kiamaniere li povus provizi "vivan akvon"?

Por trinki, Jesuo bezonis la virinon. Por ricevi la vivan akvon, ŝi bezonis Jesuon.

Niaj eklezioj foje volas ĉerpi akvon sen ĉerpilo, volas agadi sen rimedoj. Eble la najbara komunumo povas tion provizi. Ĉu tiun helpon niaj komunumoj aŭdace petis? Aŭdace provizis?

Soifo: ĉu niaj eklezioj soifas? Ĉu niaj eklezioj estas pretaj peti de aliaj kristanoj, aliaj eklezioj "Donu al mi trinki"? Ni ne forgesu ke tiel nia Sinjoro respondas al niaj petoj ankaŭ pere de la alia kristano. Ni ne forgesu ke ankaŭ ili ĉerpis el tiu fonto kiu poste ŝprucas el ĉiu kredanto en Jesuo. Same kiel ni devas dividi tion kion ni ricevis, ni devas esti pretaj ricevi. "Donu al mi trinki". Ankaŭ mi pretu doni al vi trinki, el tiu viva akvo kiun donis al mi Jesuo.

La virino fariĝis misiistino. Ŝi proponis al tiuj, kiuj aŭskultis ŝin, veni kaj vidi. La samon diris la unuaj atestantoj en la unua ĉapitro de tiu evangelio. Nia atestado estas invito al renkonto kun Jesuo, kun la vivanta akvo. Ne nin ni anoncas, nek nian komunumon, nek nian eklezion. Kaj ni ĉiuj invitas veni al tiu, kiu kapablas sensoifigi per vivanta akvo. Ni ankaŭ tion povas fari kune. En nia vivo, en nia atestado, en nia komuna atestado, la homoj renkontiĝu kun Jesuo, la fonto de viva akvo.

El la Vorto de Dio, el la Mesio, el la sino mem de ĉiu kredanto, el la bapta kuvo fluas tiu viva akvo.

Ĝi ankaŭ fluu tra la komuneco, la unueco inter ni kaj inter niaj eklezioj.

Amen.

---

[1] La aŭtoro uzis la terminon Judajoj, sed Judajo signifas la regionon, do ne la homojn. Ĉar la aŭtoro volas indiki la homojn kiuj loĝas en Judajo, la redakcio ŝanĝis la terminon al Judajanoj. La terminon Judajo enkondukis G. Berveling en sia traduko de la evengelio de Johano. Vidu ankaŭ en Vikipedio sub la termino Judeo.

## El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

15. februaro

Ho Dio, mia Patro, liberigu nin de la maltrankvileco de tiu ĉi mondo kaj plenigu niajn korojn per amo kaj respekto je Vi. Ni ne havu kontraŭajn sopirojn. Donu ke ni nur malsatu kaj sopiru al Vi.




Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 2).
Tiel Vi subtenos la agadon "Stichting Zienderogen" iniciata de J. Tuinder.

# “Ne deiru!” — vespera preĝo

## dum la ekumena kongreso en Trento, 20-an de aŭgusto 2014

Éva Farkas-Tatár, HU

Mi salutas vin. Post longa kaj laciga tago ni estas kune, kaj ni havis ankaŭ iun mirindan koncerton antaŭe kaj mi pensas ke ĝi iom tro vigligis nin. Sed mi devas konfesi al vi, ke tiam kiam mi aŭdis ilin, mi rememoris pri tio, ke en Budapeŝto mi loĝas en la strato Dohány. Tute proksime al ni estas la plej granda sinagogo en Mez-Eŭropo, belega granda konstruaĵo, kien ofte venas pilgrimantoj. Kaj en ties korto, ĝardeneto estas multaj, multaj tomboj. Dum la milito kiam tiu tereno estis la geto, homoj mortis tie en la geto, kaj oni ne povis porti ilin aliloken. Tie ili estas entombigitaj en la ĝardeno de la sinagogo. Kiam mi aŭdis kelkfoje en tiu sinagogo tiajn klezmer koncertojn, kaj kiam mi aŭdis ilin nun, mi devas pensi pri tiom multaj suferintoj kaj mortintoj, kaj iom ploras internen.

Mi ŝatus paroli ankaŭ nun pri iom pli malfacila temo. Sed mi promesis, ke mi volas heredigi al vi tiujn miajn travivaĵojn el mia longa vivo, kiuj estis tiom decidaj en mia vivo, mesaĝoj, avertoj, admonoj de nia Sinjoro, ke tiuj ŝanĝis mian vivon, do estis vere profunde gravaj.

Al tio kompreneble apartenas ankaŭ la milito. Mi estis dudek jara juna virino en 1944, kaj tiam mi havis jam naŭ monatan bebon, kiu naskiĝis en majo 1944, kiam oni komencis jam regule bombardadi Budapeŝton. La rusaj trupoj jam proksimiĝis de oriento kaj la britaj aeroplanoj venis el okcidento kaj bombardadis nin. Ni estis en Buda, en la dekstra flanko de Danubo, en la okcidenta parto de Hungario, kaj al Peŝt, do de oriento proksimiĝis la rusoj. Do ĉiuj sciis, ke Peŝt pli rapide falos, tiel tie finiĝos la milito.

Oni esence ne pensis pri tio, kiu gajnas en tiu milito. Ĉiu sciis, ke neniu gajnas, ĉi tie estos nur suferantoj, sed oni jam volis, ke finiĝu minimume, finiĝu jam, ke oni ne devu kaŝi sin.

Ĉar en la orienta flanko, tie en Peŝt ankoraŭ la hungaraj naziistoj ekzekutis kaj ankaŭ serĉadis la sinkaŝantajn judojn, do estis terura situacio tie. Kaj en la geto estis enfermitaj multaj, multaj homoj. En nia nuna loĝejo (estas kvarĉambra loĝejo) siatempe vivis pli ol 40 homoj.

Estis terura situacio tie, kaj ni estis en Buda.

Ni sciis, ke tie la milito daŭros pli longe. La germanaj soldatoj devas pafi ĝis ili havas municion, kaj poste ili mortos. Ili devas malfaciligi la antaŭeniron de la rusoj, ke ili pli malrapide atingu Germanion. Kaj se dumtempe

Hungario fariĝos ruino, tio neniun ĝenis.

Ni havis multajn amikojn kompreneble, kaj iu nia kara amiko el Peŝt, el la maldekstra flanko, kie oni atendis, ke la milito pli rapide finiĝos, diris al mia edzo, ke ni ne restu en Buda kun la bebo, sed iru al ilia loĝejo.

Sed tiutempe ni loĝis en Buda en iu grandega loĝ-bloko, el multaj konstruaĵoj kaj kun relative bone ekipitaj keloj, kien la loĝantoj povis savi sin kaj kaŝi sin. Multaj centoj vivis tie. La homoj multe ekĝojis, kiam ili eksciis, ke iu pastoro restos ĉi tie inter ni. Kaj ili venis kaj diris, kara sinjoro pastoro ĉu vi venos ankaŭ en niajn kelojn por preĝi kune, ĉar ni ĉiuj multe timas. Do ili ĝojis, ke ni restos tie.

Antaŭ ni estis la demando: ĉu savi nin, iri al la peŝta flanko kaj tie eble pli rapide liberiĝi de la milito, aŭ resti.

Vi certe konas tiun sistemon, ankaŭ en nia eklezio ni uzas libretojn kun ĉiutagaj meditaĵoj kaj bibliaj vortoj. Kaj en tiu tago, kiam ni devis decidi pri tio, ĉu ni restos aŭ iros al la alia flanko de la Danubo, do tiam tio estis la Vorto: el la evangelio laŭ Sankta Mateo, en la 27a ĉapitro, la 40a versiklo. Jesuo estas sur la kruco kaj farizeoj, ĉefpastroj mokante kun la skribistoj diris al li: deiru de la kruco! Se vi estas filo de Dio, deiru de la kruco! Savu vin, deiru de la kruco! Kun mia edzo ni preĝis kaj komprenis tion, ke nia kara Sinjoro ne deiris de la kruco. Ne savis sin, sed restis tie por ni. Kaj tiam ni komprenis tion, ke ni ne rajtas savi nin, ni devas resti tie, akcepti tiun situacion kiu sekvos. Multaj homoj esperas pri tio, ke ni restos kun ili kaj ni preĝos kune kun ili. Eĉ okazis, ke ni devis ankaŭ enterigi mortinton tie en la korto de la domo kaj mia edzo helpis al la familianoj kaj preĝis tie kune kun ili.

Do ni restis tie. Ni restis tie kaj ni travivis tion, ke eĉ unu hareto nia ne elfalis. Neniu batis nin, nenion oni forprenis de ni. Ni vivis tie kompreneble kun tre malmulte da akvo, sen elektro kun kandeleto kaj ankaŭ kun malsaneta infano. Kaj ankaŭ tio estis miraklo de la Sinjoro, ĉar imagu tion, ke ŝi ricevis iun infanan malsanon, kaj fariĝis tute ruĝa. Kaj tiam kiam en nian loĝejon (kompreneble sen frapado) envenis rusa trupo, mia edzo kriante montris la infanon en la lito, ke ŝi estas tute ruĝa, ŝi estas malsana. Ili tiom multe timis la epidemion, ke la tuta trupo forkuris el la loĝejo, nenion oni forprenis, absolute ne venis plu, do eĉ tio estis savo de la Sinjoro.

Sed imagu tion: en la fino de decembro jam en la alia flanko estis la rusoj, do tio signifas, ke de tie, de la alia bordo de la Danubo ili pafis nin. Estis tre malfacile, kaj finfine la 11an de februaro alvenis la rusoj ankaŭ ĉe ni, do tiam finiĝis la milito por ni. Dum tiu tempo konstante oni pafadis tiun grandan domon tiel, ke jam preskaŭ ne estis etaĝoj. Ni havis loĝejon en la teretaĝo, kaj nenion ni perdis. Estis miraklo, vere.

La germanoj eksplodigis ĉiujn pontojn de la Danubo por malfaciligi, ke la rusoj rapide sekvu ilin al la direkto de Germanio. Unu ponto restis nur duone pereigita, do iel oni renovigis ĝin tiel, ke oni povis trairi perpiede de unu bordo al la alia. Kaj mia edzo iris tien kaj serĉis la plej proksimajn geamikojn. Li serĉis tiun nian karan amikon, kiu

invitis nin. Li estis matematika profesoro kun edzino kaj du malgrandaj filoj kaj ilian loĝejon trafis bombo kaj la viro mortis. La infanoj kaj la edzino estis en la kelo, do ili travivis, sed ilia loĝejo tute detruiĝis. Do tiel revenis hejmen mia edzo, ke kiu volis savi nin, ke ni iru tien, al ilia loĝejo, tiu pereis.

Ni akceptis la admonon de la Sinjoro, ke ne deiru de la kruco. Restu por la helpo, ne por savi, sed tamen por helpi kaj konsoli la homojn. Kaj ni restis, kaj Dio tiel gardis nin, ke mi sentis ke la flugiloj kovris nin kaj ni estis ŝirmitaj. Tio restis por ni, por nia tuta komuna longa vivo, iu konstanta admono, ke ne deiru de la kruco. Ne deiru. Se vi ricevis iun taskon, se vi respondecas por iuj, se estas tiuj, kiuj volas apogi sin sur vian forton, eble ankaŭ sur vian kredon, ke ili sentas tion ke vi eble havas iun apartan kontaktilon kun la Ĉiela Patro, kaj ili serĉas kaj deziras tiun ŝirmon kaj tiel volas resti apud vi: ne deiru!

Tion mi volis por la hodiaŭa vespero kunporti al vi, sed kiam mi trapensis tion, mi sentis ke mi devas ion aldoni ankoraŭ. Se vi aŭdas eble similajn miraklojn de aliuloj, minacas tiu danĝero ke oni faru el tio iun regulon. Ke kristana homo ĉiam kondutas tiel. Kaj tio ne estas vero.

Kristano vivas kun malfermita koro kaj malfermitaj oreloj al la Sinjoro, por kompreni kiam kio estas aktuala. Ĉar mi rememoris pri tio, ke Sankta Jozefo en sonĝo vidis la anĝelon kiu atentigis lin, prenu la infanon kaj rapidu, kaj savu vin kaj la infanon, ĉar Herodo persekutas lin. Do li devis rapide foriri kaj savi sin kaj la familion.



"Lanc hid - Budapest 3 Febr 1946.
Foto Takkk Hungary", Takács István (Vikipedio)

Oni ne povas tute egaligi, ke ĉiam tio estas la postulo, ke kristano ĉiam restu tie, eĉ se estas danĝero por la familio. Ne. Kristano devas tre atente aŭskulti, kion la Sinjoro diras. Foje tion diras, ke restu tie, ne forlasu vian lokon. Restu tie, ĉar mi volas tie uzi vin. Mi volas tie uzi viajn manojn kaj viajn krurojn, eĉ eble viajn materiajn helpojn, do restu tie.

Sed alifoje povas esti tio, ke kaptu la viajn kaj rifuĝu. Kaj savu vin kaj ne eniru en tiun danĝeran situacion. Ne estas reguloj.

Ne estas reguloj, sed mi tial volis tion rakonti al vi, ĉar mi diris ke mi parolos pri kelkaj kazoj en mia longa vivo, kiam mi sentis, ke tute aktuale la Sinjoro iel enparolis en nian vivon kaj tute ŝanĝis niajn decidojn. Mi esperas, ke ankaŭ vi akceptos tion, kion la Sinjoro iam diros al vi. Al vi, persone.

# DONACETOJ

Julia SIGMOND, IT/RO

Estas preskaŭ nekredeble se iu diras, ke li/ŝi ne ŝatas ricevi donacon.

Ververe, ankaŭ mi pli ŝatas doni ol ricevi, kaj se eblas, mi tuj plu donas la ricevitan donacon.

Laste mi ĝojegis pro mirinda donaco. Mi ricevis ĝin de iu nekonato. Nome, li sendis al mi la recepton de irlanda pano. La preparo estas simpla, la rezulto: sensacia!

Mi kribras en mezgrandan bovlon 5 glasojn da blanka faruno, kaj miksas per 1 glaso da akvo kaj 2 glasoj da jogurto. Mi enmetas po 1 kulereto da salo, sukero kaj natria bikarbonato. Mi formas ĝin panforma per akvumitaj manoj, poste mi tranĉas sur ĝin duoblan krucon. Post 30 minuta enfornigo mi havas bongustan panon bakitan. Provu ankaŭ vi kaj pludonacu al ĉiuj, kiujn vi amas! Mi certigas vin, ĉiuj ĝojos pro tiu ĉi donaco.

Kiel ĉiuj – kiuj alproksimiĝas al la fino de la vivo – zorgas pri la fatrasoj amasiĝintaj en la loĝejo, ankaŭ mi provas liberiĝi de ili.

Kiel pasia korespondemulino, mi havas centojn da malnovaj leteroj. (Tamen, mi ne atingas Voltaire!) Mi ne havas koron forĵeti ilin. Mi eltrovis nekutiman donacon: mi resendas ilin al la aŭtoroj, aŭ se ili jam ne plu vivas, al la infanoj aŭ genepoj de la leter-skribintoj.

Nekredeblan ĝojon mi kaŭzis al multaj homoj, per ĉi tiuj leteroj skribitaj antaŭ 40-50 jaroj!

Bedaŭrinde tiu ĉi lasta donacpropono mia ne taŭgas al ĉiuj. Nur tiuj povas ĝoji kaj ĝui, poste plu donaci, kiuj havas komputilon.

Treege malmultaj homoj konas la muzikinstrumenton TEREMIN. (Serĉu ĉe Google, klikante “theremin”!) Ĝi estas tute aparta, al neniu alia muzikilo simi-lanta, sed aŭskultante ĝin, via ĝojo estos “diaregna”!

Nekredeme oni rigardas, kiel la homaj manoj ne tuŝante ĝin, nur per en aero movigataj fingroj kaj manoj, kapablas elsorĉi belegan muzikon el la kesteto kun du etaj antenoj.


Por ĉi tiu miraklojn atendanta jaro 2015, akceptu miajn donacetojn kun sama amo, kiel mi sendas ilin al vi ĉiuj!

# Přemysl Pitter, heroo de amo

Petr CHRDLE, CZ

En la Ekumena Esperanto-Kongreso en Trento mi prezentis la vivon kaj verkon de la ĉeĥa kristano kaj pacisto Přemysl Pitter. Ĝi vekis atenton, kaj pluraj partoprenantoj diskutigis min pri li eĉ enkoridore, tial mi decidis verki ĉi tiun artikolon por Dia Regno.

Přemysl Pitter estas nekonata ankaŭ por plejparto de la ĉeĥaj homoj, malgraŭ tio, ke lastan tempon aperis pri li pluraj libroj kaj ekzistas tiutema migra ekspozicio. La kialo estas, ke dum 40 jaroj de komunisma reĝimo estis danĝere eĉ diri lian nomon. Kaj malgraŭ tio, ke liajn predikojn en la ĉeĥa disaŭdigis Radio Libera Eŭropo, neniu en grandaj urboj povis tion aŭskulti pro efikaj perturbosignaloj sur la samaj radiaj ondoj.




La plej konataj el liaj agoj estas la savo de, kaj zorgo pri senparencaj infanoj, precipe judaj kaj germanaj, tuj post la dua mondmilito, kaj ilia sekva edukado.

Sed ni revenu al la komenco.

Pitter naskiĝis 1895 en praga katolika familio kiel la sepa infano. Ĉiuj ses pli maljunaj gefratoj mortis, la lasta, muzike dotita fratino, en la aĝo de 12 jaroj, kiam la patrino estis graveda kun Přemysl. La patrino estis esperantistino, kaj Přemysl kune kun ŝi vizitadis la pragan Esperanto-klubon kaj baldaŭ komencis korespondadi kun multaj eksterlandaj esperantistoj.

La patro posedis presejon; tial Přemysl, por povi transpreni ĝin post la patro, studis en la preslernejo en Lepsiko (Leipzig, Germanio). Sed li ne ŝatis la studadon, fariĝis tie diboĉemulo kaj ankaŭ ateisto. La studadon li ne finis. Ne pro la malbonaj studrezultoj, sed ĉefe ĉar en 1911 mortis lia patrino kaj en 1913 ankaŭ la patro – kaj do la nesperta diboĉema junulo devis transpreni gvidadon de la presejo.

La presejo baldaŭ falis en malfacilaĵojn. Sekve, jam en 1913, Přemysl

provis memmortigi sin. Post la malsukceso li libervole soldatiĝis por alimaniere fuĝi el la mizera situacio (financa, malamikaj sintenoj de parencoj), sed, kiel li mem konfesas, ankaŭ iom pro sia aventuremo.

Sed baldaŭ eksplodis la milito kaj li estis sendita en la fronton. Tie li rapide sobriĝis de siaj aventuremaj idealoj kaj ekkomprenis, ke en la milito regas du bazaj reguloj, kiuj ambaŭ estas neakcepteblaj por li: sklaveca obeado al la komandistoj, kaj la devo mortigadi samsortulojn, kiuj hazarde batalis je la alia flanko. Ne povante elteni tion, li dufoje fuĝis, dufoje estis mortkondamnita kaj dufoje mirakle saviĝis. Dum tiuj teruraj militaj tempoj li verkis la poemaron "Sub griza mantelo".

Foje, kiam li kuŝis vundita en kampa malsanulejo, li sonĝis, ke li troviĝas en terura situacio surmare kaj elĉerpigita diligente helpas al dronantoj. Subite ekestis splenda brilo kaj li vekiĝis kun eksento de feliĉego kaj sen doloroj. Li komprenis tion kiel volon de Dio, ke li helpu al dronantoj, kion li esprimis, ke ekde nun "la vivo ne plu apartenas al mi, sed al Dio, por servi al dronantaj homoj". Kaj tion li plenumis dum la tuta sekva vivo.

Post la reveno hejmen li studis teologion en la husana teologia fakultato en Prago, baldaŭ komencis publike diversloke prediki pri evangelio kaj pacismo – ofte subĉiele, kaj liaj predikoj altiris pli kaj pli da homoj.

Li ankaŭ partoprenadis vigle la internacian pacmovadon, ĉeestis multajn packonferencojn kaj ligis multajn ligojn ankaŭ kun ne pure kristanaj organizaĵoj, kiel britaj kvakeroj, ĉeĥaj spiritistoj kaj simile, sub influo de la sankta Paŭlo "ekkoni ĉion, elekti la plej bonan". (1 Tes 5,21 elprovu ĉion; tenu firme tion, kio estas bona;) Kaj li elektis kristanismon, tamen laŭ la evangelioj senrigarde de konfesioj.

Kiam Pitter ekkonis la mizeran situacion de infanoj en la plej malriĉa praga kvartalo Žižkov, li dediĉis ĉiujn siajn fortojn por provizi por ili iun azilejon, kie ili povus ricevi eksterlernejan edukon, spacon por ludi kaj lerni vivi kristane. Li fondis kaj ĉefredaktis la gazeton *Sbratření* (Kunfratiĝo), sukcesis kolekti monon kaj konstruigi domon nomatan laŭ sia admirato, la antaŭhusa strebanto pri plibonigo de la ekleziulara vivo Jan

Přemysl Pitter statueto ĉe St. Rupert, Nürnberg



Milíč el Kroměříž, *Milíčův dům* (domo de Milíč). Pli poste li sukcesis eĉ konstruigi domon en vilaĝo, kie la infanoj povu loĝi dum la libertempo. Tie ankaŭ eklogis kun la pragaj infanoj germanaj kaj judaj fuĝintoj antaŭ Hitlero en la tridekaj jaroj, sekve ankaŭ ĉeĥaj forpelintoj de la aneksita parto de Ĉeĥio (Sudetoj). Baldaŭ la domo ne sufiĉis; tial ĝi estis kompletigita per tendoj kun stabilaj subtendaĵoj.

Klare, li ne povis fari ĉion ĉi sola. Li kapablis ĉirkaŭigi sin per oferemaj homoj, kiuj senlace dediĉis sin al la infanoj. La plej proksima kunlaborantino fariĝis Olga Fiers, svisa civitanino, kiu konatiĝis kun Pitter kiel interpretistino dum internaciaj pac-konferencoj. Ŝi venis helpi al li en lia meritplena laboro, baldaŭ perfekte parolis la ĉeĥan kaj restis fidela al ilia komuna agado ĝis post la forpaso de Pitter.

Dum la mondmilito ili multe riskis kaŝe helpante al judaj familioj kun infanoj, kio portis al Pitter esplorvizitojn de Gestapo (nazia sekreta polico), tamen li bonŝance ne estis arestita.

Tuj post la milito li ekagis kiel komisiito de sociala saniga komisiono

Infanoj 1945



de la Ĉeĥa Nacia Konsilio: Li sukcesis ricevi por judaj infanoj, kiuj restis sen gepatroj, kvar konfiskitajn kastelojn, kiujn li rapide trasformis al sanatorioj kaj edukejoj. Jam en majo 1945 li venigis tien la unuajn judajn infanojn, plejparte el la koncentrejo Terezín.

Sed baldaŭ li eksciis, ke same teruraj kondiĉoj validas por germanaj infanoj, ankaŭ ofte sen gepatroj, en la amasigejoj, en kiuj la germanoj devis atendi la fortransporton en Germanion. Ankaŭ tie regis tristaj kondiĉoj precipe por infanoj. Ekzemple oni ricevadis nutraĵon laŭ la samaj reguloj, kiujn donis nazioj al judoj en koncentrejoj kaj mankis kuracservo. Pitter sukcesis post longaj bataloj kun oficejoj, sub sia slogano, ke ja "la infanoj kulpas nenion" ricevi permeson akcepti en la kastelojn ankaŭ germanajn infanojn, kiuj ofte, same kiel la infanoj el Terezín, venis grave malsanaj. Tial unu kastelo estis transformita al malsanulejo.

Tio do verŝajne estis la ununura loko, kie post la dua mondmilito estis prizorgataj sammaniere kaj komune judaj kaj germanaj infanoj. Kaj tie ili atendis, ĝis oni trovis iun el la gepatroj aŭ iun, kiu adoptis ilin. Sekve plejparto de la germanaj infanoj revenis en Germanion aŭ kun sia trovita patrino, aŭ en novan familion. La judaj infanoj plejparte laŭ ebloj migris en Palestinon kaj pluvivis en Israelo. Estas tre interese kaj kortuŝe legi rememorojn de la tiamaj "infanoj de Pitter", kiel ili danke rememoras al sia vivo en la "Kasteloj" kaj al sia "onklo Přemysl".

Post la komunista puĉo en Ĉeĥo-

slovakio ne plaĉis al la novaj gvidantoj la kristana gvidado de la infanoj en la Milíč-domo. Ĝi ricevis novan politikan gvidadon kaj Pitter arestota sukcesis fuĝi okcidenten. Tie li plu servis al "dronantoj", nun ne plu al infanoj, sed al fuĝintoj el komunismaj landoj en la fermita barakaro Valka apud Nurenbergo (kie nun estas monumento de Pitter). Post la malfondiĝo de Valka li daŭrigis ĉiuspecan helpon al fuĝintoj en Svislando ĝis la morto en la jaro 1976.

El la riĉa verkaro de Pitter mi menciu almenaŭ "Spirita revolucio en la koro de Eŭropo" (aperinta unue en la germana, nur sekve en la ĉeĥa), "Super la tumulto de malamo" (en la germana ĝi aperis kun la titolo "Sub la rado de historio"), "Pacismo kaj defendo", "Fajro sur la tero", "La vivo por la ceteraj", "Ĉu necesas la religia edukado?", "Preĝoj", kelkaj volumoj de liaj predikoj, pluraj libroj por infanoj, ktp.

Pro siaj meritoj pri la savo de multaj mortontaj germanaj kaj judaj infanoj li ricevis la plej altajn ordenojn de la germana kaj israela ŝtatoj, plantis sian arbon en la aleo de justuloj en Jad Vaŝem en Jerusalemo, pro siaj verkoj

Pitter kaj Fiers 1957





Infanoj 1945

ricevis honoran profesorecon en la universitato en Zuriko, sed en Ĉeĥoslovakio neniu rajtis eĉ eldiri lian nomon. Tio ŝanĝiĝis nur post la velura revolucio 1989, kiam ankaŭ hejme, bedaŭrinde postmorte, li ricevis altan ĉeĥoslovakan ordenon de T. G. Masaryk, kaj kiam komenciĝis aperadi libroj verkitaj de Pitter, sed ankaŭ pri li. Lian heredaĵon inkluzive de arĥivaĵoj kaj aŭtorrajtoj posedas la Fondaĵo de Přemysl Pitter kaj Olga Fierz, fondita en Svisio. Ĝi en la naŭdekaj jaroj translokiĝis en Ĉeĥion kaj fariĝis parto de la Pedagogia muzeo Jan Ámos Komenský (Komenio).

En Esperanto aperigis la eldonejo KAVA-PECH la libron pri la vivo kaj verko de Přemysl Pitter fare de Karel Kraft, persona amiko de P. Pitter, sub la titolo "Heroo de amo".

# Jesuo Kristo ankoraŭ aperas al homoj

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

Dum la tempo de la Malnova Testamento, la antaŭenkarniĝita Kristo aperis al Abraham, Moseo, kaj aliaj homoj. Laŭ la Nova Testamento, la releviĝinta Kristo aperis al iuj virinoj, kelkfoje al la apostoloj, kaj al pli ol kvincent (500) homoj samtempe.

Li ankoraŭ aperas al homoj kiuj malsatas kaj soifas la veron. Per ĉi tiu artikolo mi rakontas nur tri el tiaj okazaĵoj.

### Jesuo direktas homon tien, kie li trovos Biblion

Mi ĉerpas ĉi tiun informon el la oficiala revuo de mia evangelia eklezio, La Alianco Kristana kaj Misiista, la eldono el la 1-a de decembro 2013. Iuj el la misiistoj de mia eklezio laboras en lokoj tre danĝeraj. Tial, por ŝirmi la misiistojn kaj la homojn al kiuj ili servas, detaloj pri iliaj nomoj kaj la landoj en kiuj ili laboras estas kaŝitaj. Pro tiu kialo la revuo ne mencias nek la kontinenton nek la landon kie okazis ĉi tiu okazaĵo.

Sekvantoj de Jesuo Kristo sentis forte impulsitaj de la Sankta Spirito porti la Vorton de Dio al najbara lando kie estas tre malmulte da kristanoj. Sen scii precize kien ili iros, ili metis Bibliojn en sian aŭton kaj transveturis la landlimon. Je la noktiĝo, komencis forta fulmotondro. La aŭto estis obstrukcita pro la koto. La misiistoj preĝis kaj scivolis kion fari. Subite, iu frapis ĉe la fenestro. Timiĝitaj, la misiistoj subrulis la fenestron. Viro saturita de pluvo staras tie. "Ĉu vi alportis la libron", li demandis esperoplene.

> "Eliru al vojo al loko kiun mi montros al vi kaj tie atendu. Mi alportos tien la libron kiun vi bezonas por sekvi Min."

La misiistoj invitis lin eniri en la aŭton kaj tiam ili aŭskultis lian rakonton. Antaŭ tri noktojn, homo en blinduma blanko aperis al li en vizio. "Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo. Sekvu min", la brila homo alvokis. Matene, la sekvanta tago, la viro kaj siaj du filoj miregis kiam ili eksciis ke ili tri havis la saman vizion. "Sed ni ne havas ideon kion signifas 'sekvu min'", priploris unu la aliajn. (Laŭ la Evangelio de Sankta Johano, ĉapitro 14, verso 6, Jesuo diris: "Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo; neniu venas al la Patro krom per mi.")

La sekvanta nokto, la viro havis alian

vizion per kiu li ricevis instrukcion: “Eliru al vojo al loko kiun mi montros al vi kaj tie atendu. Mi alportos tien la libron kiun vi bezonas por sekvi Min.”

“Mi atendas en ĉi tiu loko preskaŭ du tagojn, kaj via aŭto estas la sola kiu preterpasas”, diris la viro. “Ĉu vi alportas la libron?” Ekstazaj, la misiistoj diris al li ke la brila homo en sia vizio estas Jesuo Kristo. Ili klarigis al li la Evangelion kaj liveris al li la Bibliojn. Tiam la misiistoj reiris hejmen.

Nuntempe, tiu viro kaj liaj filoj, kune kun aliaj personoj el ilia vilaĝo, sekvas Jesuon. Tie estas komunumo de Kristo-adorantoj kiuj daŭrigas legi la Biblion.

### Sola sed ne tute sola

Ĉi tiu informo devenas el letero sendita la 5-an de aŭgusto de 2014, el organizaĵo kiu estas produktinta la filmon JESUO en 1250 lingvoj. La filmo JESUO baziĝas sur la vivo de Jesuo kiel ĝi estas rakontita en la Evangelio laŭ Sankta Luko.

Ekzistis en vilaĝo tre rezista al la Evangelio de Jesuo Kristo nur unu kristana familio. La estro de tiu familio, Ĵaja (ne lia vera nomo), tre amis la Sinjoron Jesuon. Malgraŭ la malamikeco kiu ĉirkaŭis lin, Ĵaja fide sekvis Jesuon. Post jaroj de tia atesto, Ĵaja subite mortis. Lia atesto supoze estis senfrukta; pro lia ekzemplo ne unu homo konvertiĝis al Jesuo. Dum kiam la vidvino de Ĵaja fosis lian tombon, la homoj de la vilaĝo staris apude rigardante. Ili ne volis helpi ŝin ĉar ŝi estas kristanino.

Post ne longe, la Sankta Spirito revelaciis al ŝi, ke ankaŭ ŝia filo baldaŭ mortos. La filo malsaniĝis kaj forpasis al la ĉeesto de sia Sinjoro. La vidvino fosis lian tombon apud la tombon de sia edzo, Kaj denove la homoj de la vilaĝo staris rigardante, ne volante helpi ŝin.

Malgraŭ la malamikeco kiu ĉirkaŭis lin, Ĵaja fide sekvis Jesuon. Post jaroj de tia atesto, Ĵaja subite mortis.

Iun tempo poste, grupo de evangelistoj alvenis al tiu vilaĝo alportante la filmon JESUO. La homoj ĉirkaŭis la evangelistojn, la ekranon, kaj la projekciilon. La evangelistoj komencis montri la filmon. Tiam okazis grandega tumulto en la amaso da homoj. La tumulto estas tia, ke la evangelistoj haltigis la projekciilon. La homoj estis tre mirigitaj pro tio kion ili vidis. Kvankam ili ekvidis la filmon la unuan fojon, ili diris ke ili jam vidis Jesuon antaŭe: “Li estis la viro kiun ni vidis starante apud la vidvino de Ĵaja dum ŝi entombigis sian edzon kaj poste sian filon. Li estis flanke de ŝi plorante!” (Multfoje en la lokoj kie en la filmo JESUO montriĝas, Jesuo aperas kun aspekto de la aktoro kiu ludas Lian rolon en la filmo.)

Eksciinte ke la Spirito de Dio estis antaŭirinta, la evangelistoj refunkciigis la projekciilon. La amaso tre interesiĝis pri la filmo, tute ravita pro la vivo, la morto, kaj la releviĝo de Jesuo. Kiam

la filmo finiĝis, preskaŭ ĉiu ĉeestanto konvertiĝis al Jesuo Kristo. La multaj jaroj de la atesto de Ĵaja ne estis vanaj!

### Jesuo aperas al homo soifanta de la vero

Mi ofte ricevas raportojn el organizaĵo kiu dissendas kristanajn programojn per satelita televidado tra la tuta norda regiono de Afriko kaj la Meza Oriento utiligante la araban, la turkan, kaj farsian (lingvo de Irano) lingvojn. Se homo el tiuj diversaj landoj forlasas la tradician religion kaj fariĝas kristano, li/ŝi riskas esti arestita, batita, torturita, kaj eĉ mortigita. Pro tiu kialo, tiu organizaĵo zorge ŝirmas la identecon de la homoj pri kiuj ĝi raportas kaj eĉ kaŝas iliajn nomojn kaj la nomojn de iliaj landoj.

Mia informo devenas el la raporto de SAT-7 (nomo de la organizaĵo), la 17-an de aprilo 2014. Omar (ne lia vera nomo) estis sekvanto de la ĉefa religio de sia lando (la nomo de la lando ne estas menciita). Omar estis hejme iun nokton kaj kiel milionoj da loĝantoj en lia lando; li observis satelitan televidadon. Kiam li ŝanĝis kanalojn, li renkontis programon de SAT-7. La homoj de la programo parolis pri Jesuo. Omar estis ravita pro tio kion ili diris pri la mirakla vivo kaj instruado de Jesuo kaj pro la versikloj el la Biblio kiujn ili citis. Omar ege deziris paroli kun tiuj homoj; li ege deziris lerni plu.

Omar vidis telefonan numeron sur la ekrano, kaj aŭdis la gastiganton diri ke la aŭskultantoj povas telefoni kun siaj demandoj. Li rapide akiris paperon kaj plumon por kopii la numeron. Tiam la elektro estingiĝis kaj la televidila ekrano mallumiĝis. Omar ĉagreniĝis; sed la elektro restis estingita en tiu vespero. Li enlitiĝis, ankoraŭ pensante pri tio kion li aŭdis kaj vidis.

Dum la nokto, Omar havis vivoplenan sonĝon per kiu viro aperis al li, viro vestita kun pura, blanka robo. La viro havis belegan vizaĝon kaj el li brilis hela lumo. Li diris al Omar: “Mi estas Jesuo Kristo. Sekvu min.” Omar vekiĝis kaj tre miris. Frue la venantan matenon, li telefonis al sia amiko Zolan (ne lia vera nomo). “Zolan, io okazis! Jesuo aperis al mi en sonĝo kaj parolis kun mi. Li diris: 'Sekvu min.' Zolan, mi bezonas paroli kun vi. Ni renkontiĝu.”

Omar kaj Zolan renkontiĝis en taksio, kie ili havus sekurecon por paroli pri Jesuo. “Zolan, kion mi faru? Jesuo aperis al mi. Kien mi iru?” Zolan respondis: “Kiel mi scius? Jesuo aperis al vi, ne al mi. Vi devas trovi vian propran vojon.”

Tiam la taksiisto rigardis malantaŭen kaj diris: “ Ne maltrankviliĝu. Mi scias precize kien vi povas iri por trovi respondojn. Mi portos vin tien.” Dum ili veturis al la nova adreso, la taksiisto rakontis al Omar ke Jesuo aperis ankaŭ al li, kaj kiam li fariĝis sekvanto de Jesuo, li fariĝis nova homo. Omar tre interesiĝis.

Alveninte al la nova adreso, la taksiisto gvidis Omar-on supren al etaĝo kie kunvenis sekreta doma preĝejanaro. (En tiu urbego estas centoj da tiaj sekretaj preĝejanaroj.) Tie Omar rakontis al la kristanaj kredantoj tion kio okazis al li. Ili donacis Biblion al li kaj




ili klarigis kion signifis lia sonĝo. Plibone, ili klarigis kiel Omar povus ricevi Kriston en sia vivo kaj ili gvidis lin al la Savanto.

Omar komencis observi la programojn de SAT-7; li ĉeestis la diservojn de la doma preĝejanaro, dezirante lerni ĉion pri Jesuo kaj sia nova fido kion li povus. Dum la daŭro de tri monatoj, Omar gvidis pli ol 20 aliajn homojn al Kristo. Ĉi tiu raporto venas de viro kiu persone konas Omar-on. Li priskribis kiel Omar spertis kompletan ŝanĝon, li trovis pacon, kaj li estas unu el miloj da homoj kiuj konvertiĝas al Kristo ĉiumonate en tiu lando.

SAT-7 provizas tre gravan helpon por la loĝantoj el Norda Afriko kaj la landoj el la Meza Oriento, speciale por tiuj homoj el la landoj kiuj estas tute fermitaj al la kristana evangelio. Por la sekretaj preĝejanaroj al kiuj mankas edukitaj pastroj, kaj por tiaj preĝejanaroj kiuj estas atakitaj de la policanoj kaj dispelitaj, SAT-7 provizas valoran instruadon pri la Biblio kaj la kristana doktrino.

SAT-7 ankaŭ dissendas programojn por infanoj. Kontraste al la ŝtataj programoj por infanoj kiuj incitas malamon kontraŭ aliaj religioj (speciale la kristana religio) kaj aliaj popoloj (speciale la judoj), instruas pri tedaj religiaj ritoj, kaj eĉ honoras sinmortigajn bombistojn; la infanaj programoj de SAT-7 instruas la plejaltan moralon, amon por la gepatroj kaj respekton por ĉiuj aliaj popoloj, kaj, plej grave, amon por la Kreinto, la vera Dio. Milionoj da infanoj (ofte kun siaj gepatroj!) el landoj fermitaj al kristana religio observas la programojn de SAT-7.

SAT-7 dissendas programojn por la virinoj el tiuj landoj, programojn kiuj traktas pri la specialaj problemoj kiujn ili havas: la socian diskriminadon kontraŭ ilia sekso, pri la perforto kiun ili ofte suferas, pri la ŝanco de edukado kiu ofte mankas al ili.

La registaroj en la landoj el norda Afriko kaj la Meza Oriento ege penas obstrukcii la programojn de SAT-7. Perantoj el tiuj registaroj eĉ ofte telefonas kaj minacas homojn kiuj klopodas kontaktigi la personojn de SAT-7. Malgraŭ ĉio, pli kaj pli multaj homoj trovas kaj observas ĝiajn programojn. Pli kaj pli da homoj konvertiĝas al Jesuo Kristo, kaj pli kaj pli da sekretaj preĝejanaroj formiĝas. Kiel Sankta Paŭlo skribas en 2-a Timoteo 2.9: “La Vorto de Dio ne estas ligita.”

Glorata estu Dio!

# Invito al bibliaj tagoj kun Adoru

## de la 15-a ĝis la 19-a de aprilo 2015

Estimataj, mi ĝojas, povante inviti vin al novaj Bibliaj Tagoj 2015 kun libro ADORU. Okazos ĉi-jare en la dua semajno post Pasko, kiel kutime de merkredo vespere ĝis dimanĉo tagmeze. La dato estas: de la 15-a ĝis la 19-a de aprilo 2015.

**La URBO:** en centro de la bela silezia urbo Wrocław, Pollando.

**ALVOJAĜO**: la urbo estas sufiĉe facile atingebla. Ekzemple el Berlino ekzistas rektaj kaj komfortaj trajno-busoj; sed ankaŭ per aliaj eŭropaj trajn- kaj buslinioj, . Eĉ per aviadilo ekzistas sufiĉe malmultekostaj konektoj.

**La DOMO** – mastrumata de humurhavaj fratulinoj apartenantaj al Kongregacio de Lernejaj Fratulinoj de Notre Dame, estas belega, freŝrenovita kaj eĉ historihava. Ĝi situas proksime al la katedralo. Loĝigo estas tie en dulitaj ĉambroj. Se vi serĉas interretan sinprezentadon, vidu: www.ndwroclaw.com

**CELGRUPO:** Kaj la kvalito de la domo, kaj la situo de la domo kaj la urbo faras tiujn Bibliajn Tagojn interesaj por kaj orientanoj kaj okcidentanoj, por kaj maljunuloj aŭ nepaŝemaj homoj, kaj por junuloj. Invititaj estas kristanoj de ĉiuj konfesioj, sed ankaŭ homoj serĉantaj, kantemaj, ktp., kiuj havas iun malfermecon kaj intereson por la temo.

**PREZOJ:** Ni decidis fiksi prezon de 130 EUR por okcidentlandanoj kaj 90 EUR por orientlandanoj, ĉion ĝi inkluzivas. – Tia prezo vekus en okcidentaj landoj fortan dubon pri la boneco de la ejo, sed – ni estas en Pollando, kaj gastemaj fratulinoj ne unue havas ekonomiajn ambiciojn, sed subtenadon de valoraj spiritaj okazaĵoj.

**TEMO:** La temo de niaj matenaj prelegoj estos la t.n. Apokalipso (= revelacio, malkaŝo) de la apostolo Johano, do la lasta libro de la Biblio. Ĝi estas profeta libro bildoriĉa, kiu estas malfacile komprenebla. Sed ĝi en sia komenco deklaras "feliĉaj [tiuj] kiuj legos aŭ aŭskultos la vortojn de la profetaĵo kaj observas la skribaĵojn en ĝi, ĉar la tempo estas proksima." (Apo 1. 3). Ĝi estis skribita por la fruaj kristanoj, kiuj kredis la finon de la mondo jam proksima. Sed la libro ne unue volas esti scenario de la mondo-pereo, sed kuraĝigo de la kristanoj de ĉiuj tempoj, elteni fidelaj al ilia kredo kun granda espero – eĉ en kazoj de ĝenerala malamikeco al ili flanke de la mondo, kaj eĉ en kazo de aliaj teruraj okazaĵoj kaj katastrofoj. La ĉielaj vizioj, kiuj ĉiam denove interrompas la mondan ĥaoson, ne estas nura esperaĵo por malproksima transa mondo. Male, la saviĝo en Kristo, pri kiu parolas la antaŭaj libroj de la

Nova Testamento, en certa senco jam niatempe estas aktuala, reala kaj spertebla, eĉ se muĝus ekstera ŝtormo – kondiĉe, ke oni venu kaj restu proksime al Jesuo Kristo, la superanto de la malbono kaj la morto. Tio estas esperiga mesaĝo, eĉ en la plej malfacilaj cirkonstancoj – ĉu personaj, ĉu politikaj, kaj mi pensas, ke ĝia pritraktado helpos al ni en nia ĉiutaga normala vivo.

**PROGRAMO:** Krom la prelegoj, ni havos ĉiutagajn diservojn, preĝojn kaj kantojn el Adoru, turisman promenadon tra la urbo kun iom da renkonto de la loka kristanismo, kaj sufiĉe da tempo por amika kunestado.

**EKUMENECO:** Kiel kutime, la Bibliaj Tagoj estas ekumena aranĝo. La Biblio, kaj ankaŭ la plej multaj kantoj kaj preĝoj el Adoru interligas kristanojn el ĉiuj konfesioj. Tamen en la praktikado de la Sankta Manĝo, kaj aliaj ne-unuanimaj punktoj, ni senteme respektu la specifaĵojn de la unuopaj konfesioj. Dio helpos nin kaj benos, ke ni en interfrata amo kaj amikeco celebru lian vorton per aŭskultado kaj kantado, kaj ke ni – en la ankoraŭ nesolvitaj teologiaj demandoj – tamen respektu la nunajn staton kaj regulojn de niaj eklezioj. Eĉ tiel eltenante la nekompletecon de la eklezia unueco, estos multaj okazoj admiri kaj konstati, kion kaj kiom la Sankta Spirito faradas en la aliuloj. Per tio ni certe faros etan kontribuon al la superado de antaŭjuĝoj, miskomprenoj kaj dividiĝoj. Tio estos vera progreso ne nur por ni persone, sed servo al la universala Eklezio, kaj al la esperantlingva kristana komuneto.

Ĉiuj aliĝintoj ĝustatempe ricevos pli detalajn informojn, kiel en Vroclavo trovi lokon de la Bibliaj Tagoj. Do, mi refoje invitas ĉiujn interesitojn al kvar belaj tagoj en amika kaj spirita etoso en bela Silezio.

*Via Stefan Lepping*

**La aliĝilon sendu ĝis la 31-a de marto 2015 al la adreso:**

Stefan Lepping, Mellinstr. 5, 59457 Werl, Germanio,

stefanlepping@gmx.de

La informojn pri la Bibliaj Tagoj 2015 kaj aliĝilon oni povas akiri ankaŭ per interretaj paĝoj de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio: www.ikue.org/cz/vroclavo/bibliajtagoj.htm



# La nuna mondo, vintro por la justuloj

el LA PAŜTISTO

el la Greka tradukis Gerrit BERVELING, NL

Tiu verkaĵo LA PAŜTISTO de la frukristana profeto Hermas, estis verkita en la tempo inter 100 kaj 150 p.Kr.; oni asertas, ke li estis frato de Pio la 1-a, la episkopo de Romo (145-155).

## Tria parabolo

1[52]:1 Li montris al mi multajn arbojn sen folioj, sed ili aperis al mi, se tiel diri, velkintaj; ĉar ili ĉiuj estis similaj. Li diris al mi:

Ĉu vi vidas tiujn arbojn?

Mi vidas, sinjoro – mi diris al li –, kaj ke ili ĉiuj estas similaj kaj sekaj.

Li respondis al mi:

La arboj, kiujn vi vidas, reprezentas la loĝantojn de ĉi mondo.

2 Kial, sinjoro – mi diris –, ili do estas tiel similaj kaj velkintaj?

Ĉar – li diris –, nek la justuloj nek la pekuloj klare vidiĝas en ĉi mondo, sed estas similaj; ĉar tiu ĉi mondo por la justuloj estas vintro, kaj ili ne estas videblaj, ĉar ili loĝas inter la pekuloj. 3 Ĉar same kiel vintre la arboj, kiuj perdis siajn foliojn, estas similaj, kaj same kiel ne estas videble, kiuj estas velkintaj aŭ kiuj ankoraŭ vivas, tiel same en ĉi mondo ne estas videble, kiuj estas justuloj aŭ pekuloj, sed ĉiuj estas similaj.



Sankta Pio la 1-a estis la 10-a papo de 140 ĝis 154.

# “Patro Nia“-preĝejo

# – Alvoko –

En Jerusalemo troviĝas la t.n. “Patro Nia“-preĝejo. Temas pri tio, ke je la muro troviĝas la teksto de “Patro Nia“ en multaj lingvoj, i.a. en Esperanto.

Montriĝis nun, ke la materialo de la Esperanto-teksto aĝas kaj oni devas timi, ke la tuto pereos.

Kiel ĉiam necesas mono por la riparo.

La germana pastro Bernhard Eichkorn estas preta, kolekti monon por tiu celo kaj publikigis sian privatan banko-konton sub:


IBAN: DE47750903000006489451
BIC: GENODEF1M05

En la unua semajno oni jam povis kolekti 1310 €, sed la sumo certe ne sufiĉas. Eble necesus la triobla sumo, eĉ se ne plu. Bedaŭrinde oni ĝis nun ne povis akiri antaŭkalkuladon.

Pastro Eichkorn skribis al mi, ke li povas liveri al ĉiu donacinto t.n. donaco-kvitancon. Eble la donacintoj povas uzi ĝin por malaltigi siajn impostoŝuldojn kiel en Germanujo.

Salutas vin elkore
Karl Heinz Schaeffer

La preĝo "Patro Nia" en Esperanto,
en la Patro-Nia-preĝejo en Jerusalemo.



# 21a Ekumena Kongreso

## 68-a de IKUE 65-a de KELI

1-8/08/2015, Strasburgo (FR)

## Listo de aliĝintoj ĝis 1a februaro

1. Marija Belošević, Kroatio
2. Albrecht Kronenberger, Germanio
3. Sieglinde Stamm, Aŭstrio
4. Maria Laszlo, Rumanio
5. Terezia Scurt, Rumanio
6. Philippe Cousson, Francio
7. Eugenia Popoviciu, Rumanio
8. Antal Farkas, Rumanio
9. Margareta Olah, Rumanio
10. André Sandoz, Svislando
11. Pavol Petrik, Slovakio
12. Tibor Kepencay, Slovakio
13. Mirosława Kubicka, Pollando
14. Pavel Polnický, Ĉeĥio
15. Karl-Heinz Schaeffer, Germanio
16. Hedwig Schaeffer, Germanio
17. Párkányiné Kaszab Erzsébet, Hungario
18. Aleksandra Gabrilo, Kroatio
19. Oldřich Arnošt Fischer, Ĉeĥio
20. Gabriella Stier, Rumanio
21. David Bisset, Britio
22. Jean Bisset, Britio
23. Endel Ojasild, Estonio
24. Joonatan Ojasild, Estonio
25. Siegfried Krüger, Germanio
26. Serio Boschin, Italio
27. Giovanni Daminelli, Italio
28. Bernhard Eichkorn, Germanio
29. Stefan Lepping, Germanio
30. Norbert Sudland, Germanio
31. Bengt Olof Åradsson, Svedio
32. André Åradsson, Svedio
33. Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Hungario

## La Biblio en planlingvoj

Estimataj samideanoj, mi permesas al mi informi vin, ke mi verkis sufiĉe ampleksan eseon pri ”La Biblio en planlingvoj”. Kompreneble la ĉefan parton kovras Esperanto. Kvankam la teksto bedaŭrinde estas en la germana, eventuale ĝi tamen interesos KELI.

(La skanita eseo estas ankaŭ havebla ĉe la redaktoro: dr_boarad@yahoo.se)

Kun bondeziroj por 2015 mi sincere salutas vin

Detlev Blanke
Otto-Nagel-Str. 110
DE-12683 Berlin
00-49-30-54 12 6 33
detlev@blanke-info.de

# Nekrologo de Wim DERKS

De Hoog foje miris pro la manko de ia sciigo en Dia Regno pri la morto de Luyken, la honora prezidanto de KELI. Ŝajnas al mi ke li pravis. En nia gazeto ni devas eviti tiajn lakunojn kaj publikigi nekrologojn de niaj membroj. Sekve mi petis la redaktoron, ankoraŭ aperigi la suban tekston, kiun mi verkis en 2004.

La 17-an de februaro 2004 mortis en Sittard, Nederlando, Wim Derks, esperantisto, sed pro lia modesteco ne tre konata ĉe la Keli-anaro. Li naskiĝis la 6-an de septembro 1923 en Heythuysen, iris al la gimnazio kaj studis ekonomion en la nuna universitato de Tilburg.

Dum la dua mondmilito Wim lernis Esperanton kaj tuj post tiu nigra periodo publikigis kelkajn artikolojn en La Praktiko, gazeto sub la redakto de Andreo Cseh. En la sekvantaj jaroj li ne plu havis tempon por tiu lingvo, ĉar li devis fari sian profesian karieron. Tio fine kondukis lin al la pint-estra funkcio en la konzerno Campina.

Kiam li emeritiĝis en 1983 li intense reokupis sin pri la Internacia Lingvo, funde restudante ĝin. Regula gasto en la kursoj de La Chaŭ-de-Fonds en Svisio kaj de Homburg en Sarlando. Mi bone memoras liajn realistajn vortojn dum stud-semajnfino en Nancy en 1989, Esperanto, nun post 100 jaroj, staras ankoraŭ kiel la unuaj kristanoj en la katakomboj.



Wim Derks diskrete fariĝis grandskala mecenato de nia lingvo: finance helpis junajn verdstelulojn, abunde subtenis novajn projektojn, abonis sennombrajn revuojn, aniĝis al plej diversaj organizoj i.a. al KELI kaj kreis por si altvaloran Esperanto-bibliotekon.

En la persona kontakto li krome estis humurplena, varmkora kaj ĉiam en la alia interesita. Mallonge, eminenta esperantisto, eĉ pli, eminenta homo forlasis nin.

Ed Borsboom

# Aŭdu, Di' de l' am'

OUVE, DEUS DE AMOR




OUVE, DEUS DE AMOR • HEAR US, GOD OF LOVE • Textes pour la semaine de prière pour l'unité des chrétiens et pour toute l'année, p. 20 • M: gvajkurua, adaptita de Simei Monteiro • portugala kaj angla T: Simei Monteiro • © 2000 General Board of Global Minestries, GBGMusik. 475, Riverside Dr, New York, NY, 10115 • E: Albrecht Kronenberger 2015-01-07